

BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 2a — Februaro 1956a

Fondita
en 1908a



Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Nia venonta Beneluksa Kongreso en GENTO

Tiu ĉi numero estas ĉefe dediĉata al nia Beneluksa Kongreso en Gento.

La L.K.K. ne jam povis havigi al ni definitivan programon, sed tamen kunmetis provizoran programon, kiu, grandlinie, iĝos ankaŭ la definitiva kaj kiun ni do presigas en la nuna numero.

Niaj legantoj krome trovos, en tiu ĉi numero, interesajn artikolojn pri la urbo mem, ĝia historio kaj ĝia Mannekenpis.

En la momento de la presado de tiu ĉi numero, proks. cent membroj de la kunarangantaj ligoj aliĝis al la Kongreso.

La aliaj do, kiel eble plej baldaŭ sekvu tiun ekzemplon.

La provizora programo

SABATON: je la 13.30a h.: Malfermo de la Akceptejoj; de la 16a ĝis la 18a: Kunvenoj de la Institutoj kaj laborkunsidoj de la Ligoj; je la 20a: Oficiala Malfermo; je la 21a: Vizito al la lumigitaj monumentoj; poste: Interkonatiga Vesperto kaj agrabla kunejo.

DIMANĈON: je la 9a: Di-servoj; je la 10a: Oficialaj Kunsidoj de la Ligoj; je la 11.30a h.: Oficiala Akcepto en la Urbdomo; je la 12.30a h.: Fotografado; je la 13.30a h.: Komuna Tagmanĝo; je la 15.30: Promenado tra la malnova Gento; je la 20.30a h.: Festvespero.

LUNDON: je la 10a h.: Grupaj vizitoj

Ni anoncis ke la januaro numero estas la lasta sendata al la membraro de 1955.

Grupoj tamen petis nin ankoraŭ sendi la februaran numeron al ĉiuj pagintoj de 1955.

Ni tion faris, ĉar pro la akra vintra periodo, iĝis malfacila la reakiro de kotizoj de kelkaj membroj, kiuj pro la malvarmo ne regule ĉeestis la kunsidojn.

Ni tamen avertas, ke la marta numero ne plu estos sendata al la ne-repagintoj.

La Loka Kongresa Komitato

Prez. S-ro G. De Boes, Pr.ses Clementinal. 31, Gent.

Vic.Prez. S-ro J. Timmerman, Oudenaardse stwg. 52, Zevegem.

Vic.Prez. S-ro E. de Wolf, Joh. de Breukstr. 18, Haarlem; Nederland.

Sekr.ino S.ino A. Gruslet, Meerstr. 40, Gent.

Kas.ino F.ino J. Terriijn, Raapstr. 74, Gent.

Anoj S.ino Van Wanseele, P. Fredericqstr. 27, Gent.

S-ro V. Vanneste, Normaalsch.str. 9, Gent.

Kongresa P.ĉ.k. 1006.30 - Gent.

ĉu al Gravenkasteel, ĉu al Byloke, ĉu al la Botanika Ĝardeno, laŭplaĉe; je la 12.30a h.: Komuna Tagmanĝo; je la 14a: Folkloraj posttagmezoj; je la 16.30a h.: Adiaŭa Kunsido.

La akcepto, la festvespero kaj la adiaŭa kunsido, same kiel la kunsidoj de Belga kaj Flandra Ligoj okazos en „Colombophile”. Presid. Rooseveltlaan 6, dum la kunsidoj de LEEN okazos en „Hôtel de Londres”, tute apude.

La komunaj manĝoj okazos en „Raads-kelder”.

*
*
*

Mallonga Historia Skizo pri la Urbo Gento

1) Ĝeneralajoj.

Estas en la tempospaco de tri periodoj ke en Okcident-Eŭropo la urboj ekestis. Unue la Romana periodo; due, la Mezepoko; kaj trie la dekaŭa jarcento. En la unua periodo estas diversaj kaŭzoj kiuj estigis urbojn (komerco, koloniigo fare de Romanaj eksmilitistoj ktp.). Dum la dekaŭa jarcento, la kolosa evoluo de la industrio faris tion. En la Mezepoko estas denove la komerco, ĉu la ekesto ĉu la reapero. En tiu epoko la komercistoj bezonis ĉefe du aferojn: trafikebleco kaj protektebleco. Tial ili ĉiam elektis restadlokon apud rivero aŭ vojo kaj samtempe apud fortika-

„MI NE HAVAS TEMPON”

„Mi ne havas tempon”, mi ĉiam ekdiras, Kiam la estrar’ mian helpon deziras Por la propagando, por kurso aŭ festo, Aŭ se ĝi instigas min nur al ĉeesto De membrokunveno pri teda afero, De konversacio aŭ lumbildvespero Prelego, kunsido, kongreso, ekskurso, Publika leciono aŭ ia konkurso. Mi ne havas tempon kaj se mi ĝin havas, Ekzistas afer’ kiu pli por mi gravas. Radio, revu’, detektiva romano, Min pli interesas ol eksterlandano. Se gekonatoj al brigi’ min invitas, Mi Esperanton volonte evitas. Kaj krome la mondo de ŝajno min tiras; Kinejon tri fojojn semajne mi iras. Mi ne havas tempon; vi tion komprenas Sed tio ja por la estrar’ ne konvenas. Ĝi devas labori kaj varbi kaj gvidi, Arangi, paroli, raporti kunsidi Kaj ĝi organizu, plenigu la kason, Ĝi per propagando atingu l’ amason, Do ĉia labor’... de l’ estrar estas tasko Kaj mi?... Nu, mi plendas, se estas fiasko!

H. Veenstra.



jo. Tiu lasta povis esti aŭ kastelo aŭ eĉ natura fortikigita loko kiel insuleto ekzemple. La fakto de granda malsekureco kaj manko de polico klarigas tiun lastan nepran kondiĉon.

2) La antaŭurba periodo.

Oni ofte faras la demandon pri la aĝo de iu urbo kaj ĉu tiu-ĉi urbo estas pli antikva ol tiu alia. En tiuj kazoj oni ne pripensas ke la urboj en la komenco estis preskaŭ ĉiam nur lokiĝoj de kelkaj personoj aŭ familioj sen iaj ajn ligiloj. Je iu momento, eksteraj kaŭzoj devigas tiujn personojn al komuna agado, kaj

(Daŭrigo paĝo 16)

U.N.E.S.C.O. Novajoj

Nur en 15 landoj la virinoj ne havas voĉdonan rajton

La novembra numero de UNESCO Courier raportas, ke nur en 15 landoj la virinoj ne havas voĉdonan rajton. La unua lando, kiu donis al la virinoj tiun rajton, estis Novze-lando en la jaro 1893. Ĝis la komen- ciĝe de la Unua mondmilito nur 3 aliaj landoj sekvis tiun ekzemplon. Hodiaŭ la situacio estas tute alia, pre- cipe en Eŭropo kaj en la Okcidenta parto de la mondo, kie nur Svislando, Liechtenstein, Paragvajo kaj Nikara- guo ankoraŭ ne donis al la virinoj la politikajn rajtojn.

En sia lukto por la egaleco de la seksoj en edukado kaj profesiaj kari- eroj la virinoj devis kontraŭbatali la tradician opinion, ke ili estas malsu- pera sekso. Sed, laŭ la Usona antro- pologo Prof. Ashley Montagu, en tiu aserto troviĝas pli da poezio ol da vero. Li skribas: „La scienca fakto estas, ke la virinoj estas laŭ la na- turo superecaj al la viroj kaj mi al- donas, ke por tio ni devas esti dan- kemaj..., ĉar en tiu fakto mi vidas la esperon de la mondo.” Laŭ Prof. Montagu la supereco de la virinoj montriĝas en jenaj aspektoj:

Ili vivas pli longe: „Ĉie la virinoj povas atendi, ke ili vivos pli longe ol la viroj.”

Ili estas pli sanaj: „La virinoj es- tas pli rezistaj kontraŭ la plej parto de malsanoj kaj resaniĝas de ili pli ofte ol la viroj...”

Ili pli facile toleras la ŝokojn: „Dum la lasta milito montriĝis, ke la viri- noj en karceroj kaj koncentrejoj rez- istis tiujn kondiĉojn pli bone ol la viroj. Preskaŭ ĉie, en ĉiu lando, je unu virina sinmortigo estas tri viraj sinmortigoj.”

Ili estas pli inteligentaj: „Je la aĝo de 5 jaroj, kiam la plej parto de infanoj eniras en la lernejojn en Usono, la knabinoj estas mense du jarojn antaŭ la knaboj kaj konservas tiun avantaĝon dum la studjaroj.”

Kial, do, tamen la mondo estas „vi- ra”? Prof. Maurice Duverger, fran- ca politika sciencisto, esploris la viri- najn politikajn kaj sociajn rajtojn en Norvegujo, Franclando, Germanujo kaj Jugoslavio. Laŭ li la kontraŭsta- ro de la viroj respondecas por tiu si- tuacio, sed tiu kontraŭstaro ne estus sukcesinta, se la virinoj estus montrin- taj pli fortan reziston. „La malgran- da influo de la virinoj en la gvidado de la ŝtato estas larĝe ŝuldata al la inerteco de la virinoj”, diras Prof. Duverger.

En la sama numero de Courier, A. H. Hourani, lektoro en la Universitato de Oxford, informas pri la relative malmulte konataj ŝanĝoj, kiuj okazis

Lingvo kaj Naciismo en Azio

La freŝdataj okazintaĵoj en Hindujo kaj aliaj Aziaj kaj Afrikaj landoj

en la pozicio de la arabaj virinoj. Nur en la plej postrestintaj regionoj ekzistas ankoraŭ poligamio, dum en ĉiuj aliaj ĝi malaperis same kiel la vualo. La revuo donas ankaŭ kelkajn novajn faktojn pri la virinoj „kiuj fa- ras nenion dum la tuta tago krom esti hejme”, nome la dommastrinoj. En Franclando, ekzemple, la dommas- trino laboras 70 horojn semajne. Es- ploroj montris, ke en Usono, Britujo, Belgujo kaj Franclando la dommas- trinoj administras pli ol 60 %-ojn de la mono en tiuj landoj.

La esploroj de UNESCO pri tiu ĉi demando ne montras ke la virinoj troviĝas sur la vojo atingi la saman pozicion, kiun havas la ĉambuli-triboj en Nova Gvineo, kie la virinoj estas ekstere la tutan tagon kaj laboras tie por akiri panon al la familio, dum la viroj restas hejme, ludas la fluton kaj dekoracias sin per floroj.

Latina Ameriko almilite analfabetismon

Du pluaj ŝtatoj de la Latina Ame- riko — Bolivio kaj Ekvatoro — ali- ĝis al la grandskala kampanjo direk- tita al la forigo de analfabetismo. La kampanjo, lanĉita de la Organizaĵo de Amerikaj ŝtatoj celas interalie krei 100.000 legocentrojn por novaj lernin- toj de ĉiuj aĝoj en 20 respublikoj de la Latina Ameriko.

Usona muzeo televizios en koloroj

Baldaŭ komenciĝos la televidaj el- sendoj en koloroj rekte el la galerioj de la Muzeo de Artoj en Boston. La direktoroj de la Muzeo asignis pli ol 100.000 dolarojn por instali televidajn aparatojn ĉar ili opinias ke tiaj pro- gramoj povas havi por la televido la saman signifon, kiun havis kaj havas la simfonio por la radio. La serio de ĉiusemajnaj elsendoj rekte el la muzeo komenciĝos per programo dediĉita al ĝia mondfama Azia kolekto.

Laŭ UNESCO-Courier kaj UEA-Informservo

Komuniko

Sano E. Bokarev MOSKOU T. 19
Volhonka 18/2 Lingvistik-Instituto
U.S.S.R. (Rusujo)

ricevis de la registaro la permeson por starigi la unuan centron de espe- rantistoj en Moskou.

Estus dezirinde ke multaj esperan- tistoj skribu al la Rusaj gesamidea- noj. Tio pruvus la vigecon de nia movado en la Okcidento. Cetere ni pensas ke multaj deziras havi kores- pondant(in)on en tiu lando.

montris, ke ĉe ĉiu popolo la tendenco al nacia lingvo estas nepre bezonata fazo en la evoluo al memstara ŝtato.

Laŭ la Hinduja konstitucio art 343 la hindia estas la oficiala lingvo. Flanke de tiu, la angla restos uzata dum la unuaj 15 jaroj kiel la dua oficiala lingvo, almenaŭ en tiuj okazoj, kie ĝi estis uzata tuj antaŭ la kome- co de la konstitucio.

Jam en 1953 tamen montriĝis ling- vaj malfacilaĵoj de alia karaktero. Estiĝis movado, kiu havis la tenden- con estigi apartajn ŝtatojn sur lingva bazo. Ĉe la formado de la nova ŝtato Hindujo oni ĝenerale konservis la anglan dividadon en administraj unu- ojn. Hindujo tamen estas multlingva lando (laŭ la registara jarlibro de 1955 oni parolas tie 845 lingvojn kaj dia- lektojn) kaj tiel okazis ke en regiono vivis tri popoloj kun tri diversaj lin- gvoj, kiuj estis regataj en kvara lin- gvo, plejofte angla aŭ alie hindia.

Tia situacio kondukis al nova naci- ismo sur lingva bazo. Kvankam tio povis endanĝerigi la unuecon de la lando, registaro kaj parlamento tamen komencis ŝanĝi la administrajn unu- ojn en lingvajn unuojn. En la sudo oni ŝanĝis parton de la ŝtato Madras kie la popolo parolas telugon, al apar- ta ŝtato, Andra-ŝtato. Tio estas nur unua paŝo, ĉar oni parolas parte ankaŭ telugua en Hajderabad kaj ĉar la resto de Madras ankoraŭ estas du- lingva: oni parolas tie tamil kaj mal- ajalam. Tiom longe kiom temis pri lingvaj grupoj de 20 milionoj aŭ pli, oni povas daŭrigi la principon.

Ekzistas tamen ankoraŭ multe da malpli grandaj lingvaj grupoj kaj ek- zistas bezono je ĝenerala lingvo. Oni tamen eniris tiun ĉi vojon kaj en okt. 1955 la ĵurnaloj sciigis, ke komisiono de tri personoj prezentis projekton por reformi la limojn de la apartaj ŝtatoj de Hindujo. Laŭ la projekto la nom- bro de ŝtatoj malpliĝos de 29 ĝis 16. Oni enkalkulis lingvajn, religiajn kaj ekonomiajn faktorojn. En kelkaj re- gionoj oni pleje akcentis la strategi- an faktoron. Kvankam do la lingva faktoro ne estas la nura decida, ĝi tamen ŝajnas esti tiel grava, ke la komisiono avertas kontraŭ regiona apar- teco per la divido en lingvaj unuoj. Oni rekomendas daŭrigi la uzadon de la angla lingvo, almenaŭ ĉe la supera instruado. La enkonduko de Hindi tiel okazu, ke ne estiĝos vakuo kaj la supera instruado ne suferos domaĝon.

Same kiel en Indonezio lingvoŝanĝo povas kaŭzi gravajn malhelpaĵojn en la universitata instruado. Tio ŝajnas al mi notinda fakto, ekz. por la plua evoluado de nia literaturo.

Oni atendas ke la registaro akceptos la projekton preskaŭ senŝanĝita,

GASTIGADO DE FRANCA ES- PERANTISTO

La franca esperanta asocio G.E.E. (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) deziras ricevi adresojn de esperantis- toj kiuj akceptus gastigi senpage dum unu semajno francan esperantiston. Reciproke ni sendos al vi adresojn de francaj esperantistoj kiuj estas pretaj akcepti vin sub samaj kondiĉoj. Por informoj, skribu al:

S-ino Trésorier 7, rue des Iris - BESANÇON (Doubs) - Franc.

kvankam en kelkaj regionoj oni tute ne estas kontenta.

El la antaŭa evidentiĝas ke ekzistas konflikto inter tendenco al regiona lingva naciismo kaj unu kunliga lin- gvo. Oni ne povas atendi ke la angla restos uzata kiel ligo inter la diver- saj ŝtatoj. Tiucele oni uzos pli kaj pli hindi-an. Dum la vizito de Kruĉev kaj Bulganin al Hindujo en nov. 1955 oni parolis nur ruse kaj hindie, kio kaŭzis gravajn malfacilaĵojn al la ĵurnalistoj.

En Pakistano samspeca evoluo oka- zas. La oficiala lingvo en la parla- mento ankoraŭ estas la angla, sed la kono de tiu ĉi lingvo malplibonigas ĉe la pli junaj parlamentanoj. Tio kaŭzis tendencon al oficialigo de la dialektoj de Pakistano, antaŭ ĉio de Urdu en Okcident- Pakistano. En O- rient-Pakistano estas parolataj diver- saj dialektoj: bengali, puŝto, sendhi kaj pundjabi, kiu diverseco kompre- neble malfaciligas solvon de la pro- blemo.

Ankaŭ en Malako la naskiĝanta nacia koncio postulas unu nacian lin- gvon: malajan. Ĉe la unuaj ĝeneralaj elektoj en Malako (en julio 1955) unu el la programpunktoj de la du gran- daj partioj estis: enkonduko de mal- aja kiel nura oficiala lingvo.

Kaj fine Indonezio. Ankaŭ ĉi tie la naskiĝanta naciismo ek de la komenco estis firme kunligita kun batalo por propra nacia lingvo. La situacio ĉi tie malsimilas al tiu en aliaj Aziaj landoj. En Indonezio oni ne proklamas unu el la ĉefdialektoj kiel nacian kul- turlingvon, sed oni konstruadas la t. n. bahasan indonesian surbaze de jam dumlonge ekzistanta „helplingvo”, mal- aja. Antaŭe nur helplingvo por ne- kulturaj celoj, kiel komerco, interri- lato kun servistoj k.t.p., ĝi devas nun iĝi lingvo riĉa je esprimiloj kaj ka- pabla servi kulturajn celojn en plej vasta senco de la vorto. Oni do tre konscie laboras por la konstruado de la lingvo. Same kiel en Izraelo nova konscie prilaborita lingvo ludas gra- van rolon ĉe la forĝado de nova po-

41-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

KOPENHAGO - (DANLANDO)

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 3

OFICIALA KOMUNIKO

Januaro 1956

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

BANKO: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

POSTGIRKONTO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820 Kopenhago, Danlando.

ALIGOJ: Validas la kotizo ĝis fino de marto: danaj kronoj 43,— edzino no 21,50, ĝejnuloj 14,50, studentoj 21,50. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7,—, edzino de kongresano 3,50.

ALIGILOJ: Bonvolu peti aligilojn ĉe via Landa Asocio.

NOVA FAKA KUNVENO: Anoncis sin: Kristana Esperantista Ligo Inter- nacia, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

BLINDULA KONGRESO: En la kadro de la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago okazos la 26-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj.

KONGRESA GLUMARKO: Bonvolu mendi ĝin ĉe via Landa Asocio aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

INFANA KONGRESETO: Esperanto-parolantaj infanoj ĝis 13 jaroj povas partopreni ĝin. Loka Kongresa Komitato tre re- komendas aliĝi multnombre al tiu nova arango, kiu celas kuraĝigi la uzon de Esperanto inter infanoj.

DUA BULTENO: Ĝi estos sendata al ĉiu kongresano en februaro kun ple- naj informoj pri loĝigado kaj ekskursoj.

TIVOLI: Dum la tuta kongresa semajno la kongresanoj ĝuos senpagan eniron en la faman parkon „Tivoli”, en Kopenhago.

ARTIKOLOJ: LKK petas vin sendi gazet-eltonnaĵojn pri la 41-a Universala Kongreso aperintaj en naci-lingvaj gazetoj. Rekompense vi ricevos esperant-lingvan prospekton.

STATISTIKO: (ĝis fino de decembro): Argentino 1, Aŭstralujo 3, Aŭstrujo 5, Belgujo 2, Brazilo 2, Britujo 69, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 171, Finnlando 6, Francujo 34, Germanujo 21, Hispanujo 11, Islando 7, Ita- lujo 39, Jugoslavio 39, Kanado 2, Nederlando 19, Norda Rodezio 1, Norve- gujo 39, Nov-Zelando 1, Svedujo 96, Svisujo 7, Turkujo 1, Usono 4. Sumo: 581 el 24 landoj (pasintjare 452 el 25 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

pola unueco.

Kvankam kompreneble la rezulto ankoraŭ ne estas tute klara, laŭ sper- tuloj oni povas konsideri la eksperimen- tion sukcesinta. Prof. d-ro A. Teeuw, profesoro en la universitato de Utrecht, kiu vizitis la kongreson por bahasa indonesia en Medan, en 1954, diras, ke evidentiĝis, ke tiu ĉi lingvo praktike kaj principe ne plu estas problemo. Kaj tio signifas gravan pa- ŝon antaŭen sur la vojo al nacia unu- eco.

Ĉie do en la vekiganta oriento oni povas konstati, ke same kiel en la Eŭropo de la Renesanco la nacia kon-

scio estas forte ligita kun tendenco al propra kulturlingvo. La nombro de kulturlingvoj do nepre kreskos. Ju pli da sciencaj kaj aliaj kulture gravaj verkoj en tiuj ĉi lingvoj el- doniĝos, des pli pristudindaj ili iĝos.

Ĉu la angla daŭre ludas gravan ro- lon ĉi tie, tio ankoraŭ ne estas klara. Dum la Azia konferenco en Ban- dung en 1954 evidentiĝis, ke la angla ankoraŭ estis la helplingvo en Oriento. La estonteco pruvos ĉu tio daŭros. Por la Esperanto-movado la tasko estos observi kaj pristudi la evoluon de la lingva situacio en Azio.

H. G.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 rui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

La Fondajo Antoinette Jennen

„La Verda Stelo“ Antverpeno gajnis la premion 1955

La finkalkulo de la Intergrupa Konkurskurso, kun premio donacita de la Fondajo Antoinette Jennen montris kiel venkinton, la Antverpenan Grupon „La Verda Stelo.“

Tiu venko estas des pli meritplena ĉar la gajninta grupo estas la plej forta grupo aliĝinta al nia Ligo kaj por kiu do la plialtigo de ĝia kvociento signifas plej fortan plialtigon de ĝia membronombro.

Jen la rezultato, kun la komparaj ciferoj de la antaŭa jaro:

Lokaj grupoj	Poentoj	Kvociendo	
	1955	1954	1955
Antverpeno	750	646	116,1
Brugo	309	272	113,6
Gento	100	103	97,1
Charleroi	41	45	91,1
Bruselo	398	461	86,3
Verviers	104	161	64,6

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 16an de decembro dum la Zamenhofa Vespero oni revokis la spiriton de nia kara Majstro. S-ro J. Verstraeten atentigis pri kelkaj aspektoj de la „homo“ Zamenhof: S-ro A. Verhoeven deklamis poeziaĵojn kaj S-ro K. Ameryckx prizorgis la muzikan parton de la vespero per konvenaj kantoj, li estis akompanata de F-ino Cl. Peeters. S-ro G. Van den Bossche flegis la libro-ekspozicion kaj la librovendado havis grandan sukceson.

La 23an F-ino L. De Winter organizis la Kristnaskfeston kun plena programo: S-ro J. Montmirail prizorgis la magnetofonon kaj aŭdigis belan muzikon; F-ino Bl. Geers rakontis kristnaskan historion; F-ino M. Hofkens montris pentraĵojn rilate al la naskiĝo de Kristo. S-ino R. Lecat ankaŭ rakontis kristnaskan okazintaĵon kaj S-ro H. Vermuijten antaŭlegis tradukitan parton el libro de Felix Timmermans, la flandra verkisto. Kaj la surprizo: F-ino Jacqueline Van Havermaet, filineto de nia fidela membro Maurice) deklamis, laŭ mirinda maniero, spritan kaj konvenan poezion! Per la kristnasktombolo kun multaj premioj, oni

konkludis tiun agrablan vesperon.

La 30an, la lasta kunveno de la jaro. S-ro J. Verstraeten pere de lumbildoj bonege memorigis pri la diversaj okazintaĵoj de 1955 kaj S-ro J. Montmirail ree prezentis la filmon de li verkitan pri la 50jara jubileo de R.B.L.E. en Antverpeno. Per sinceraj vortoj, la Prez. S-ro M. Jaumotte jam esprimis siajn novjarajn bondezirojn al la membroj.

La 6an de januaro, okaze de la nova jaro. S-ro M. De Ketelaere, kiu anstataŭis S-ron M. Jaumotte kiel Prezidanton, esprimis siajn dezirojn por la bona farto kaj de la grupo kaj de la membroj. S-ino L. Bernaerts enkondukis S-ron De Muynck, kiu paroladis vikle kaj sperte pri „Maŝinŝmirado“ kaj akiris krom la konstanta intereso de la ĉeestantoj ankaŭ ties aplaŭdon.

La 13an, dum la ĝenerala jarkunsido, la sekretario S-ro J. Verstraeten kaj la kasisto S-ro R. Balleux prezentis siajn tradiciajn jarraportojn. La prezidanto S-ro Maur. Jaumotte, post laŭdaj vortoj pri siaj tujaj kunlaborantoj (kaj en kies nomo S-ro M. de Ketelaere respondis) disdonis la medalojn „pro fideleco“ al la gejubileantoj. Estis honorigataj: pro 40jara membreco: S-ino H. Schoofs, S-roj M. Jaumotte kaj M. De Ketelaere; pro 35jaroj: S-roj M. Boeren kaj H. Vermuyten; pro 30 jaroj: S-ino J. De Hondt; pro 25 jaroj: F-inoj H. kaj M. Hofkens kaj S-ro W. Boffejon; pro 10 jaroj: S-ino Henny Jacques-De Ketelaere. (*)

*) Pro la jubileaj festoj de R.B.L.E., la publikigo de la nomoj de niaj jubileintoj 1955, estis prokrastita... ĝis hodiaŭ!

Ni tamen volas memorigi nun ke en 1955 la Grupo honorigis, kiel jubileantojn 1955 S-inojn Félicie Jaumotte-Meulemans; Gisèle Schoofs kaj Rena Lecat, antaŭmilita esperantistino.

La medalo pro dekjara membreco estis ankaŭ donacata al aliaj antaŭmilitaj esperantistoj, kiuj dum pluraj jaroj ne estis aŭ restis membroj de la Grupo sed reigis fidelaj nome S-roj P. Peelman, Remy Van Eynde, Ch. Aalders; G-roj K. kaj M. Ameryckx, S-ro Arthur Claes; F-ino Blanche Geers; S-ro Willem Dollez, S-ino Plil. Janssens, S-ro Richard Torremans kaj S-ro J. kaj S-ino Jacobs, al kiuj ni rediras la gratulojn, jam diritajn antaŭ unu jaro.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

La 20an, S-ro R. Van Eynde prezentis belan sonfilmon „Gasparone“ je la kontenteco de la multnombraj aŭskultantoj.

Dimanĉon, la 22an, en la salonoj „Magnus“, Prins Albertlei 17, Berchem la jara festeno kunigis ĉirkaŭ la festotablon 66 festenantojn. La agrabla salono tuj vekigis la bonan humoron kaj la tre bongusta menuo (la kartoj senkoste havigitaj de S-ro Ch. Aalders) kontentigis eĉ la plej grandan elektemulon. Post la deserto S-ro Maur. Jaumotte bonvenigis la ekstergrupanojn kaj laŭdis tiujn, kiuj kunhelpis al la kreskigo de la grupo. Pro tio S-ro M. De Ketelaere, vic-prezidanto, respondis per sinceraj vortoj. Parolis, nome de R.B.L.E., S-ino J. Plyson, vic-prezidantino, kaj nome de la brusela grupo, S-ro R. Jacobs, S-ro J. Verstraeten toastis je la sano de la sinjorinoj kaj floroj estis disdonataj al S-ino H. Schoofs kaj S-ino Marg. Jaumotte. Poste, agrablaj kaj amuzaj horoj forpasis en vera familia rondo.

Vendredon, la 27an, oni prezentis la unuan Kabaretan Vesperon de ĉi tiu jaro. En sama gaja atmosfero kiel kutime, la tre varia programo disvolvigis kaj je la fino S-ro Maur. Jaumotte dankis elkore la gekunlaborantojn: F-inojn J. kaj M. Ameryckx, Cl. Peeters kaj E. van den Neste (kiu aŭdigis belan pianludon); S-roj K. Ameryckx, P. Peelman (la kunmetinto de la programo), Fr. Schellekens, W. Van Nereaux kaj A. Verhoeven. S-ro J. Montmirail zorge flegis la magnetofonon. S-ro Peelman tutspecale verkis kanton pri la grupo laŭ tre konata melodio.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe **BELGOMINE**

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

La 41a Universala Kongreso de Esperanto-Kopenhago

Kongres-Kotizoj	ĝis la 31a de marto	ĝis la 30a de junio
Kongresano	300	350
Edzino	150	175
Junul(in)o, ne pli ol 20 jara	100	120
Studentoj	150	175

Aliĝontoj, kiuj ne estas Individuaj Membroj de U.E.A., aldonu 50f pli.

Vendredon, la 3an de februaro, okazis la parolata ĵurnalo.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“ Frankrijklei 4, je la 20,30a h. (1a etaĝo).

Marto: la 2an: Film prezentado de F-ino Lena DE KEYE pri vojaĝo al LA SANKTA LANDO: la 9an: Amuza vespero; la 16an: Parolado de S-ro L. DEROISY, pri FABRIKADO DE LA ZIPO (ritssluiting-fermeture éclair); la 23an: Kabareta Vespero; la 30an: **Sankta Vendreda Atmosfero.**

Kondolencoj

Dum la lastaj tagoj de la jaro 1955, S-ino Philips perdis sian karan patron.

Nome de ĉiuj, ni kondolencas al nia kara membrino ĉe tiu ĉi ĉagreniga perdo.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 20an de decembro estis donata la lasta leciono de la elementa kurso. La kursgvidinto, S-ro Ch. Poupeye, gratulis la ĝelernintojn, akcentante ke tiu kurso estis unu el la plej bonaj laŭ fideleco, laboremo kaj kapableco de la lernantoj. F-ino Georgette Wybouw dankis lin per sprita alparolado en kiu ŝi imituzis la plej kutimajn dirmanierojn de la kursgvidanto kaj ŝi proponis al li, nome de ĉiuj ĝelernintoj, belan donaceton.

Lasta kunveno de la jaro, okazis la 27an de decembro prezidata de S-ro D. Meulenaere, vicprezidanto, kiu anstataŭis la prezidanton hejme retenatan pro forta malvarmumo. Dum tiu kunveno, S-ino S. Verbeke-Vanden Berghe interese antaŭlegis pri la „Historio de Esperanto.“

La unua kunveno de la jaro 1956a, okazis la 3an de januaro: la serioza parto entenis legadon kaj klarigadon de la grupa statuto kaj la dua parto estis agrabligata per disaŭdigo de lastsukcesaj diskaj prunedonitaj de S-ro E. Herreweghe.

Pro malbona neĝa vetero, ĉeestis nur malmultaj ĝemembroj la kunvenon de la 9-a de januaro. Kiel ripetiga leciono, estis donata dikto, post kio F-ino Y. Poupeye

antaŭlegis pri: „L. van Beethoven.“

La ĝenerala kunsido de la grupo okazis la 17-an de januaro en ĉeesto de 32 ĝemembroj. En sia morala raporto, la prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, precipe pledis por unueca agado kaj fiksas kiel celon por 1956a la enskribon de la 100-a membro. Detala raporto pri la grupa vivo estis prezentata de F-ino Y. Van Parys, sekretariino, kaj financa raporto de F-ino. Is. Van Parys, kasistino. Ĉiuj raportoj estis aplaŭde aprobatj. Post aprobo de la administrado dum 1955a, la ĉeestantoj reelektis entute, sen sekreta baloto, la elirintan komitaton, sed propono pri aldonado de unu plia komitatano estis farata. La ĝenerala kunsido plie ekzamenis la punktojn: programo pri estonta agado kaj petoj aŭ proponoj de la membroj kaj estis kronata per la subskribo de la grupa Ora Libro kaj la kuna kantado de „La Espero.“

En pli posta komitata kunveno la komitatataj postenoj estis dividataj jene: Prezidanto: S-ro Ch. Poupeye; Gevicprezidantoj: F-ino A. Boereboom, S-ro D. De-meulenaere, S-ino S. Verbeke-Vanden Berghe; Sekretariino: F-ino Yolande Van Parys; Kasistino: F-ino Isabelle Van Parys; Helpa Sekretario: S-ro Robert Lagast.

La sama komitata kunveno decidis doni honorigajn titolojn al du estintaj komitataninoj: S-ino M. De Baets-Huyghe kaj S-ino M. J. Viane-Vanden Berghe, tiel ke la Honora Komitato estas nun kunmetita jene: Honora Prezidantino: F-ino Yvonne Thooris; Honoraj Vicprezidantinoj: S-ino M. Algrain-Coucke kaj S-ino M. De Baets-Huyghe; Honora Sekretariino: M. J. Viane-Vanden Berghe; Honora Kasisto: S-ro Karel Decoster; Honoraj membrinoj: F-ino Alberthe Ledene kaj S-ino Albertine Ramboer-Kiere.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiutage je la 20a en sidejo „Gouden Hoorn - Cornet d'Or“, Simon Stevinplaats 2, Tel. no. 314.59:

Februaro: (memorige) kun ŝanĝoj ek de la 14-a) 14-an: Karnavalo. Ekskurso al Heist; 21an: a) Lastaj preparoj por la balo kaj por la nova kurso. b) Triopa interparolado; 25an: (sabato) je la 21-a en „Concordia“ Dua vintra balo; 28an: a) Nova kurso por komencantoj kaj progresantoj. Ĉiu varbu kaj alkonduku almenaŭ unu novan lernanton. b) Interkonatiĝo inter la

Gratuloj

Korajn gratulojn prezentas R.B. L.E., ĝiaj estraro, administrantaro kaj membraro al nia kara S-ino Félicie Staes-Vandevoorde, veteranino en nia movado, kaj kiu, la 13an de januaro, atingis sian 90an naskiĝtagon.

Kun niaj gratuloj, ni diras al ŝi nian admiron ĉar, ĉe la plej gravaj okazantaĵoj en nia movado, kiel antaŭ nur kelkaj semajnoj okaze de la festeno de la Brusela Grupo, — ni ŝin ankoraŭ regule povas vidi en nia mezo, kun ŝia ĉiama bonhumoro.

Al multaj pliaj jaroj en nia rondo!

novaj ĝelernantoj kaj la aliaj ĝemembroj.

Marto: 6an: a) leciono; b) Disaŭdigo de diskaj; 13an: a) leciono; b) Portretludado; 20an: a) leciono; b) Legado de B.E.; 27an: a) leciono; b) Parolata gazeto.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

BRUSELO

Esperantista Brusela Grups

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 21an de Novembro, S-ro Vander Stempel pritraktis, kiel profesoro de perfektiga kurso, la korelativajn vortetojn.

La 29an, Amuza vespero dum kiu S-ino Weijn kurigis nin ĉirkaŭ tabloj kaj ankaŭ intruis nin ŝajne nenion!

La 5an de Decembro, Parolata ĵurnalo, kies premion akiris S-ino Elly Staes kun „Arthur Honneger“.

La 12an, Plej grava vespero de la jaro: Zamenhofa Vespero. Muziko de S-ro Vander Stempel; Poezio de S-ro Piron, kiu ankaŭ kantis por la membroj.

La 20an, S-ro Van der Stempel daŭrigis

(Sekvo sur paĝo 16)

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^e

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

La Gent'a „MANNEKEN PIS”

(laŭ teksto de S-ro A. Van de Walle, Estro de la Urba Turisma Oficejo).

Legante la titolon multaj pensos ke ni fanfaronas ĉar ĉiuj scias ke nia ĉefurbo postulas la monopolon de tiu ĉarma kaj originala vireto por si!

Ni konsentas, kaj tamen la „Artevelde”a urbo havas la sian, sed je pli naŭva maniero ol tiu de Brusel.

Je konkurs-demando certe multaj ne sciis respondi kie ĝi troviĝas. La knabeto cetere havas malmultan pretendon kaj restas tre modesta je malnova fasado ĉe la ankoraŭ pli malnova „Kraanlei”.

Tamen ĝia historio estas interesa kaj apartenas al tiu rava serio da romantikaj kaj revemaj legendoj de la malnova Gent.

La komika statueto troviĝas en la apudeco de la Grafa Kastelo, konstruita en 1180 de Filipo de Elzaso. Tio ne estas hazardo kaj jen kial:

Revenante de la Sankta Lando la grafo havis kun si malgrandan troviton kiun li amegis kaj estis edukita ĉe la kortego de la ĉarma grafino Elizabeto de Vermandois.

Oni nomigis la knabeton Boudewijn. Ĉar li ŝajnis posedi ĉiujn fizikajn kaj moralajn kvalitojn, li tre rapide estis amata de ĉiuj.

Iam, dum vizito al siaj vastegaj bienoj en Nord-Francujo, grafo Filipo, havante tre kolereman karakteron, havis egan disputon kun la abato de St Vaast. Temis pri interŝanĝo de fama relikvo de la abatejo kontraŭ alia kiun la grafo kunportis de la krucmilitoj. La abato rifuzis kaj tial grafo Filipo tiel koleriĝis pro tiu kuragega kontraŭstaro ke li punbatis la religiulon pro lia bravegeco. Ŝajnas ke pro tiu sakrilegio la ekleziulo tuj malbenis la grafon eldirante „Vi estos trafita en viaj plej sinceraj korinklinoj”. Tiu malbeno veriĝis jam ĉe la hejmvieno de la grafo: ĝi trafis la plene senkulpan Boudewijn. Tiu sortobato rompis la kreskopovon de la knabeto, kaj plie li perdis sian sindoneman kaj amindan karakteron.

Kolerema kaj maliceta, li iĝis vera tirano por siaj ĉirkaŭantoj kaj ju pli li maljuniĝis des pli li senĉese ĉagreniĝis ilin. La knabeto degeneris en ega furiozulo. Oni pretendis ke li eĉ ekdrinkadis. Se en la kastelo oni abomenis tion, ĉe la pli kontentigebla Gent'anaro, tiaj liaj famo kaj popularo kreskis. Liaj sennombraj ruzaĵoj, ŝercprovokaĵoj kaj respektforĝaĵoj heroigis lin en tiu tempo de la ruza „Reinaert” (la vulpo) kaj de la petolema „Tijl”.



Iun tagon, kiel kutime, la festoj ĉe la reveno de Krucmilitintoj komencis per festa sekvantaro. Ekleziaj kaj urbaj estroj partoprenis kaj la aro foriris de la „Sta Veerle” preĝejo ĉe la „Oudburg”. Ĉe la komenco estis Grafo Filipo kaj lia edzino kaj sekvis la altranguoj de la kortego, la burleskuloj kaj minstreloj, ĉiuj ceremonie vestitaj. Ankaŭ la eta Boudewijn, sub gardo de sia intendanto, partoprenis tiun unuan parton. Oni esperis ke la religia ceremonio havu ian edifan influon sur la princa aĉulo.

Sed, Ho ve! Estis vana espero. Boudewijn montrigis tiun tagon eĉ pli malgentila ol iam: li nur celis ridegi la modeste surgenuiĝintan popolaron pere de novaj grimacoj kaj aŭdacaĵoj. Kiel ĉiam li sukcesis senrespekte ridigi la piajn rigardantojn kaj, fiera pro tiu sukceso, li iĝis tro-kuraĝa. Veninte ĉe la „Kraanlei” li ankoraŭ intencigis la gajecon pretendante ke li surloke devis..... Lia pia estro ne sukcesis kompreni lin ke ne decis je tiu loko kaj momento; la juna aĉulo, je ĉies konsterniĝo, levis sian multekostan damaskan vestaĵon kaj vide al la alvenanta sekvantaro, sin metis en la pozo kiu famigis lin. La tuta impona aro da nobeloj, korteganinoj kaj magistratoj parade marŝis preter la senhonta, ridetanta eta senseriozulo. La altranguoj, la Urbestro kaj skabenoj de Gent, la religiuloj ĉiuspecaj preterpasis kaj ŝajnis malestimati indiferentecon aŭ ŝajne ne estis genataj de tiu senhonta parado.

Tamen dum la preterirado de la civila parto la ekscoso de rid-krioj atingis la plej altan gradon. Kiam la tuta sekvantaro preteriris kaj eksilentigis, tiam oni aŭdis nur la freŝan ŝprucadon de la akveto kiu senhalte fluis al la „Leie”.

El la Flandra Poezio

Mi revas jam

(Ik droome alreë)

GUIDO GEZELLE (1830-1899)

Mi revas jam, infan', pri vi,
kaj pri la gajaj tagoj la tagoj
dum kunc fide spertos ni,
forflugu tagoj, flugu pli,
pri ĝojoj kaj pri plagoj.

Mi revas jam, infan', pri vi,
al mi neniom gravas, ne gravas
la tera gust' amara, nur
pri l'koro' atenta kaj statur',
ĉar la spirito bravas.

Mi revas jam, infan', pri vi;
vi nokton trabatalis, batalis,
sternitan de l'malbonfarant'
super la promesita land':
por vi ĝi senvualis.

Mi revas jam, infan', pri vi,
kaj mi surstrate pasos, mi pasos
portante kaŝe en anim'
esperapogan penson: vin,
vin Dio al mi lasos.

trad. H. Vermuyten

Tuj kiam la sekvantaro ree estis je sia elirejo, la gardisto de la knabeto iris serĉi lin kaj, oh, mirindaĵo, trovis lin tie ŝtoniĝinta!... Grafo Filipo averte, tuj venis surloke kaj ekvidante tiun nekredeblan transiĝon, ekploregis. Kompatemuloj petegis la grafon pri la ŝtonetulo por ĝin montri eterne al la popolaro kaj lokigis ĝin ĉe la fasado de malnova domo vidalvide de la loko kie la ŝtoniĝo okazis. Ek de tiam ĝi tie spitas pluvon kaj venton aŭ sunumas sian molkarnecon ĉe la suna vetero.

Oni asertas ke grafo Filipo, trafita de tiu miraklo, duan fojon partoprenis la krucmilitojn kaj glorie pereis post kiam la abato de St Vaast pardonis al li.

Nun ke vi konas la historion de la Gent'a „Manneken Pis”, vi certe iros ĝin admiri kaj vi nekontesteble ankaŭ asertos ke pro ĝia arkeologia valoro estus pli bone por la urba beleco forigi ĝian figfolion kaj redoni al ĝi la akvoŝprucadon kaj meti la tuton kontraŭ malnova fasado, ekz., aŭ sur ĉarma placeto; ĝi iĝus plia allogaĵo en la malnova GENT!!

Marvojaĝo de Botelo

La 21an de Julio 1951a mi forlasis ŝipe la insulon „Terschelling” *). Mia valizo estis plenplena, sed ne nur pro la ordinara pakajo. Ne, mi kunportis kvin botelojn.

Post proksimume 20 minutoj da veturado la ŝipo ekruladis kaj ektangis. Ĝi venis en la markolon „Vlie”. Vlie kunligas la Waddenmaron al Nordmaro.

Kun miaj boteloj mi iris ferdeken kaj jetis la botelojn en la „malsekan elementon”.

Jam antaŭe mi klopodis forjeti botelon en la maron ek de la strando, sed la ondo ĉiam redonis la botelon sur la strandon.

Mi kalkulis, ke la fluo tra Vlie estas norden la sekvantan tagon. Do, se mi jetus botelojn en Vlie-n, mi havus la sanĉon ke ili drivus Nordmaren. Mi preparis leteretojn por kvin boteloj, la plej bonajn en 6 lingvoj en la plej bonajn botelojn, la pli malgrandajn en la malpli bonajn botelojn.

Kiam mi jetis la 21an de julio la botelojn enmaren, mi opiniis ke la plej granda eblo estas, ke ili alfloros sur la strandojn de la insuloj Vlieland kaj Terschelling aŭ eble Tekselo aŭ Ameland. Se ili havus feliĉon ili eble vizitus Germanion. Sed kiel granda estis mia miro, kiam en Septembro 1952a mi ricevis leteron el Francio ke tie alfloris botelon.

Iu sinjoro Toupet el Montrouge pasigis la ferion en Bretagne.

La 20an de Aŭgusto 1952a, li promenis sur la strando de la duoninsulo „Penthièvre” **), kaj..... kion alportis tie la maro al li? Botelon! Sed estis io en tiu botelo: letero! S-ro Toupet sekigis ĝin kaj legis je elprenis la leteron. Montriĝis, ke la botelo estis tute seka interne. Nur la papereto en ĝi estis iom humida. S-ro Toupet sekigis ĝin kaj klegis je sia miro, ke tiu botelo venis el „les Pays Bas”. Ĉu spritaĵo aŭ seriozo? S-ro Toupet konsideris ĝin serioza, kaj li ne eraris.

Post 1 jaro + 1 monato — 1 tago la poŝtbotelo finis sian marvojaĝon.

Ĉar troviĝis en ĝi nur malgranda papereto (hazarde ankaŭ france, mi povis konkludi ke ĝi estis unu el la malpli bonaj boteloj. Poste la trovinto konfesis tion: ĝi estis bierboteleto.

Mi skribis al K.N.M.I. (Reĝa Nederlanda Meteorologia Instituto) fako „Oceanografio kaj Mara Meteorologio”. Oni respondis, ke oni treege ŝatas ekhavi miajn raportojn pri la vojaĝo. Mi sendis detalajn informojn kaj post kelka tempo ricevis vojaĝpriskribon de sinjoro Groen, adjunktdirektoro de la fako „Oceanografio kaj Mara Meteorologio.

Li skribis i.a.:

Egipta Paro vizitis Nederlandon kaj Belgion

Farante tra-eŭropan vojaĝon, antaŭ ne longe vizitis nin ges-roj Joussef el Aleksandrio, kiu restadis en Nederlando por revidi parencojn kaj geamikojn ĉar sino Rosa M. Joussef-Strobbe estas de nederlanda deveno kaj meritplena eks-kunlaborantino en la Haga sekcio de L.E.E.N. Ambaŭ vizitis ankaŭ belgajn urbojn kaj grupojn.

Samideano Ing. Mohamet Joussef, ŝtata ŝipkonstru-inspektoro spertis ĉe ni koran akcepton, ankaŭ (komprene-

„Ekzistas du eblecoj. Ambaŭ estas neprobablaj, sed la vojaĝo montras, ke en la naturo kelkfoje okazas la malprobabla.

La unua ebleco estas, ke la botelo drivis en la Sudan Nordmaron, tiuokaze konjekte laŭ la angla flanko, poste tra la Markolo de Calais glitis, kvankam la fluo estas plej ofte nordorienten, sed kie oni observas kelkfoje — dum fortaj nordokcidentaj ĝis nordaj ventoj en Nordmaro — transporton en la alia direkto.

Ankaŭ en la Markolo de Dover la fluo estas plej ofte nordorienten sed loke precipe apud la bordoj — aŭ por nelonga tempo sub influo de la vento, la fluo estas kelkfoje alidirekta. Tiu ĉi vojaĝo estas proksimume 1300 km. La alia ebleco estas:

Unue norden tra la Germana Golfo ***) kaj laŭ Sud-Norvegio, poste transiri al Skotlando. Sed tiam revenas la neverŝajna: Norde kaj okcidente de Skotlando, la fludirekto estas plej ofte nordorienten. Sed ankaŭ tie ĉi esceptoj (lokaj kaj dumtempaj) povas konfirmi la regulon. Poste la botelo drivus tra la Atlantiko al la Golfo de Biskajo. Ĉi tiu vojaĝo estas proksimume 3500 km. longa.

Kiu el la du eblecoj estas pli verŝajna estas malfacile direbla. Ne dependis de la distancoj de la du eblaĵoj. Kelkaj maroficiroj konsideras la duan vojaĝeblon pli probabla ol la unuan. En 13 monatoj multo povas okazi. Se la botelo brave super la akvo elstarus, la vento povus movigi ĝin kelkfoje ankaŭ kontraŭflue.

K. Ruig.

*) Terschelling: posicio: 53o-23' Norda Latitudo, 5o-15' Orienta Longitudo.

**) Penthièvre: 47o-30' N.lat., 3o-06' W.long. (Quiberon) W signifas „okcidento”. En la Navigacio oni uzas „W” kiel mallongigo de la vorto okcidento. Ĝi do ne estas litero, sed signo, same kiel X, Y kaj grekaj literoj en la matematiko.

***) Deutsche Bucht: 53-56 N.lat., 8-30 O.long.

ble) en la ŝipkonstruejoj. Estas konate ke Egiptujo mendis antaŭ kelkaj jaroj diversajn ŝipojn ĉe la nederlanda industrio, kies liverado akiris tiom da kontento de la mendintoj ke ni povis legi en la decembraĵoj gazetoj pri nova mendo farita de la Egipta Registaro nun por specialaj ŝipoj cele la teĥnikan bontenadon de la Aleksandriaj havenoj; mendo kiu sumiĝas pli ol kvar milionojn da guldenoj.

Enkondukata de s-ro C. J. Keur de la Ministerio por Socialaj Aferoj kaj Publika Sano ges-roj Joussef vizitis inter alie la internacie bone konatan Gero-fabrikejon en Zeist (entrepreno kun 1800 kunlaborantoj) kiu produktas la argentan kaj blankmetalan mangilaron kaj la tablo-bezonajojn de restoracioj en kaj por la grandaj ŝipveturkompanioj.

La direkcio de la Gero-fabrikejo, en la persono de s-ro J. W. Meenhorst dignastile akceptis la gastojn kaj montrigis la entreprenon; poste sekvis amika renkonto en la hejmo de s-ro Meenhorst kie lia edzino gracie prezentis bongustan vespermanĝon.

Sekvis ankaŭ interkonatiĝo kun la Teĥnika Lernejo en Utrecht (unu el la plej grandaj lernejoj en sia specoj en la lando) kies subdirektoro s-ro G. H. Koudijs, prezidanto de la Utrechta sekcio de L.E.E.N. bonvenigis la gaston, kiu kiel komisionano por Teĥnika instruado en Egiptujo alte ŝatis tiun bonan okazon esperantlingve interparoli pri sistemoj kaj metodoj. Vere, tiu vizito estis bonega okazo atesti pri la internacia praktikeco de Esperanto ankaŭ por la araba lingvo-teritorio, la vizitanto rimarkis.

Dum la rondiro tra la kursoj la renkonto kun s-ro A. van Wijnen, kiu montris en la klaso la esperantlingvan interesigon de lernantoj, tuŝis la eksterlandan gaston.

Afabla invito ankaŭ atingis Ing. Joussef de s-ro R. Slot, subdirektoro de la Komunuma Teĥnika Servo de Zeist por fari samideanan viziton al la ĵus finkonstruitaj grandaj betonaj tre modernaj instalaĵoj por purigo de kloaka fluidaĵo en la regiono. Jam pli ol 100 inĝenieroj vizitis en la antaŭaj semajnoj tiun teĥnikan novigon en la mezo de la lando.

Sekvis en kontakto de s-ro Keur ankoraŭ diversaj aliaj interkonatiĝoj (al Laborejoj por invalidoj; al fakinstruejoj por plenkreskuloj k.t.p. — ankaŭ tie esperantlingvaj renkontoj!)

Post plenokupita periodo de restado en nia lando ges-roj Joussef revojaĝis hejmen, petante esprimi en Nederlanda Esperantisto siajn plej koraĵajn salutojn al la nederlandaj gesamideanoj.

(daŭrigo de paĝo 13)

sian kurson pri la korelativaj.

La 27an, finiĝo de la Jaro per Kristnaska Vespero. S-ino Elly Staes dekoraciis la salonon kaj s-ino Weyn amuzis nin, kune kun S-ro Weyn per kanto kaj tombolo. Poste sekvis dancado.

La 9an, S-ro Swinne klarigis tre interese la diversajn „sekretojn” de la bonbonfabrikado. Li gustumigis al ni diversajn sukerajojn.

La 16an, S-ro Vander Stempel instruis al ni la sekvon de la korelativaj vortoj per multaj ekzemploj.

Ni aldonas ke la komitato por 1956 konsistas el:

Prezidanto: Jacobs, René
Vic-Prezidanto: Weyn, Marguerite
Sekretario: Jirousek, Marcel
Kasisto: Schumacher, Hubert
Help-Sekretario: Wijlie, Alexandre
Komitatano: Vander Stempel, David
Komitatano: Piron, Claude

Programo de la venontaj kunsidoj:

ĉiulunde en „Brasserie St-Martin”, 38, Granda Sablito Placo la etaĝo, je la 20.15a h.

Marto: la 5an: Parolata ĵurnalo; la 12an: S-ro Jirousek: „Vegetmanĝistoj”; la 19an: S-ro Vander Stempel: Perfektiga Kurso; la 26an: S-ro Swinne: Mitul-Vespero.

Aprilo: la 9an: Parolata ĵurnalo; la 16an: S-ro Vander Stempel: Perfektiga Kurso; la 23an: S-ino Weyn: Amuza Vespero.

Daŭrigo de paĝo 9

konsciigas ilin pri komunaj intereso. Tiam alvenis la momento ke povas ek esti urbo kun ĉiuj ĝiaj institucioj. En la kazo de Gent, oni trovis tie objekton el la ŝton- kaj metalperiodoj. Tio estas tute natura. La kunfandiĝo de la du riveroj Skeldo kaj Leie faris ĝin destinita loko. 530 Km. da navigeblaj akvovojoj. Rekta kontakto kun la Norda Maro. Sed tio al ni nenion instruas pri la graveco de la tiea homgrupo. La nomo mem de la urbo estas sendube unu de la plej malnovaj en Flandrujo. Unuafaje ĝi estas menciita en la 7a jarcento en rilato kun la Kristanigo de la regiono. Sed ankaŭ tio ne provas ke jam temas pri vera urbo. Ni scias ke Gent iĝis tiam humila komerco-centro. Ĝi dankas tion al la Sta. Bavo-abatejo kiu posedis terenojn kaj en Germanujo kaj en Anglujo. Tiu monaĥejo estigis la havenon Gent.

En la daŭro de la 9a jarcento la Normannoj regule envadis Okcident-Eŭropon kaj detruis ĉion. Ili venis al Gent en 879 kaj starigis tendaron. La monaĥoj estis forkurintaj. Baldaŭ la terkultivistoj ankaŭ. La okupado finiĝis en 883. Tre malrapide la antaŭ-

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ**Antverpeno**

„In 't Duifken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64; Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
Suoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arhitektio. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Ĥemiaĵoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagĵurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteir. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Amerijckx, Helmstraat 154, Bergerhout. Peltaĵoj
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
S-ro A. van den Neste, Deurnebaar 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

Brugo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 31. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strove, Vlamingsstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Gelmuntstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵoj: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85

KOMERCISTOJ kiuj sen koste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumajoj
Van Kerkhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Snuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj ĝardenilaro
Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojag-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liélens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viaĵo MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikaĵoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX” 16, rue Ernest Laude 15.28.29

aj loĝantoj revenis. Sed la grafo de Flandrujo Balduino la 11a estis akaparinta ĉion, eĉ la terenon de la du abatejoj. Li konstruigis tie fortikaĵojn proksimume kie staras nun la fama Grafa fortikaĵo. Pli malfrue, kiam la urbo mem estis ĉirkaŭmurita, oni nomis tiun unuan fortikigotan lokon: Oudburg (Malnova fortikaĵo) kaj tiu nomo restis ĝis hodiaŭ. Gent iĝis de nove haveno kaj komerco-centro, nun ĉirkaŭ la fortikaĵo, pro sekurecmotivoj; la nuna legommerkato. Tiuj unuaj loĝantoj estis certe komercistoj. Sed tre baldaŭ venis ankaŭ metiistoj diverspecoj kiuj trovis laboron ekz. per la ŝipkonstruado. Poste oni konstruis kapaletan (kiu pligrandigis;

la nuna Sta. Bavo-preĝejo). 941 La grafo Arnulfa 1-a rekonstruigis la du monaĥejojn, al kiuj li ankaŭ redonis la urban terenon. La Skeldo-rivero estis la limo inter Flandrujo kaj Germanujo kaj Gent sur tiu limo, estis tre ofte en danĝera situacio. Tio ŝanĝiĝis en la unua parto de la 11a jarcento kiam Grafo Balduino IVa sukcesis akapari teritorion oriente de la Skeldo, enhavantan la landon de AALST. Gent, ne plu sur la landlimo, estis en pli granda sekureco. Nun, Gent rapide evoluis ĝis, por tiu tempo, granda urbo.

Fernand ROOSE.

(daŭrigota)